

LA JUNA BATALANTO

Organo de la Internacia
Katolika Junulara kaj Paca Movado

ELDONATA DE
MONDJUNULARO KATOLIKA, MOKA

Redaktoro : D-ro WILHELM SOLZBACHER.

ENHAVO :

Manifesto : Por Malarmado kaj Paco! — **Krucmilito de Eŭropa Junularo** por Malarmado. — **Wilhelm Solzbacher**, Letero de la Redaktoro al Siaj Geamikoj. — **Walter Mudrak**, Ĉu Diservo aŭ Idolservo? — **Hungara Skolta Rondo**, Helpu Esperanton por la Venonta Skolta Mondjamboreo! — **John Nibb**, La Kvin Rabistoj, rakonto por geknaboj ĉinaj. — **Rigardo en la Tempon** : La enkarcerigo de Gandhi. — Konflikto inter Ĥinujo kaj Japanujo en Manĉurio. — Stranga sinteno de la Esperanto-gazetoj de Oomoto. — Incito al milito estas krimo. — **Alois Norbert**, Aĉetu bonajn librojn! **Pawel Roch**, La Pacifista Movado en Polujo (I-a parto). — **Nia Movado**. — **Sur Nia Librotablo**.

REDAKCIJO : Köln — Dellbrück, Bensberger Marktweg, 63, Germ.

Eldonejo : ELDONA KOOPERATIVO LA JUNA BATALANTO,
Köln—Dellbrück, Bensberger Marktweg, 63, Germ. (Regina Solzbacher).

Abonprezoj de "La Juna Batalanto"

Normala abonprezo: jare 2 germanaj markoj, kun MOKA-membreco 3 M. La eldonejo akceptas monbiletojn, ĉekojn, poŝtmandatojn, respondkuponojn, germanajn poŝtmarkojn.

Lando	jara abono	kun MOKA-kotizo	simpla kotizo	Lando	jara abono	kun MOKA-kotizo	simpla kotizo
Anglujo	2 s 4 p	3 s	1 s 3 d	Hungarujo	2 4 p	4 p	2 p
Argentino	1,50 p	2 p	1 p	Italujo	9 l	14 l	5 l
Azio	2 s	3 s	1 s 3 d	Japanujo	2 s	3 s	1 s 3 d
Aŭstralio	2 s	3 s	1 s 3 d	Jugoslavujo	30 din.	40 d	15 d
Aŭstrujo	3,40 s	5 s	2 s	Litovujo	5 lit.	7 l	1 l
Belgujo	3,50 b	6 b	2 b	Luksemburgo	18 fr	25 fr	0 fr
Brazilo	4 mr	5 mr	2 mr	Meksiko	0,50 dol	0,75 d	0,30 d
Ĉeĥoslov.	16 kr	20 kr	10 kr	Nederlando	1,25 fl	2 fl	0,80 fl
Danujo	2 kr	3 kr	1 kr	Polujo	4 zl	6 zl	3 zl
Danzig	2 g	3 g	1,20 g	Portugalo	8 esc	12 e	5 esc
Francujo	12 fr	18 fr	6 fr	Rumanujo	80 lei	100 l	40 lei
Germanujo	2 M	3 M	1,20 M	Svedujo	2 kr	3 kr	1 kr
Grekujo	38 dr	50 dr	15 dr	Svisujo	2,50 fr	4 fr	1,50 fr
Hispanujo	3 p	4,50 p	2 p	Usono	0,50 dol	0,80 dol	0,30 dol

Ni akceptas ankaŭ pagojn por duona jaro aŭ kelkaj jaroj. Membroj de MOKA ricevos ankaŭ aliajn publikigaĵojn. Donacoj por la subtена kaso (liverado de J. B. al malriĉuloj) estas invitataj.

Abonejoj: Krom al la eldonejo oni povas ankaŭ pagi al la naciaj sekretarioj de MOKA.

Poŝtkontoj. Germanujo: Köln 480 37 (Dr. Wilh. Solzbacher, Köln-Dellbrück); Francujo: Strasbourg 8180 (P. I. A. Muffang, Bourg-la-Reine); Aŭstrujo: Wien D 12.017 (Katholisches Kreuzbündnis für Oesterreich, Ortsgruppe Heiliges Feuer).

ESPERANTO EN LA SERVO DE LA INTERNACIA KATOLIKA AGADO!

Katolikajn informojn el la tuta mondo

rapide havigas al vi la dumajna, grandformata, riĉe ilustrita gazeto KATOLIKA VIVO. Direktoro: Pastro Georges Ramboux, Paris.

La internacia katolika junulara kaj paca movado

eldonas por vi sian riĉenhavan, vivece verkitan, kuraĝe batalantan dumonatan organon LA JUNA BATALANTO. Redaktoro: D-ro Wilhelm Solzbacher, Köln.

Kombinita abono al Katolika Vivo kaj La Juna Batalanto

kostas por tuta jaro 6.— RM., por duona jaro 3.— RM. Oni pagas al **Eldonejo La Juna Batalanto, Dr. W. Solzbacher, Köln-Dellbrück, Bensberger Marktweg 63, Germanujo** aŭ al la Poŝtkontoj sciigataj, sur la dua kovrila paĝo de ĉi tiu gazeto. Banknotoj, ĉekoj, poŝtmandatoj, respondkuponoj, UEA-kuponoj ktp. estas akceptataj.

NOTU la novan komunan adreson de la Internacia Oficejo de MOKA kaj de Redakcio kaj Administracio de LA JUNA BATALANTO: Köln-Dellbrück, Bensberger Marktweg 63, Germanujo.

Krucmilito de Eŭropa
Junularo por Malarmado.

Por malarmado kaj internacia paco!

La grandega plimulto en ĉiuj nacioj volas pacon, ne militon.

La militfalintoj, sen diferenco pri ilia nacieco, donis la vivon por la venonta paco, ne por la venonta milito.

La sanktaj postuloj de la kristanismo estas al ni evangelio de la paco, ne religio de la milito.

Ni partoprenantoj je la Krucmilito de Eŭropa Junularo por Malarmado postulas tial de la registaroj de ĉiuj ŝtatoj:

Ke ili fine plenumu la solenajn promesojn, kiujn ili donis al siaj popoloj dum la milito kaj kiujn ili renovigis kaj konfirmis en la Kontrakto de la Ligo de Nacioj kaj en la Kellogg-Pakto,

Nome ke ili demetu la armilojn de la memdetruo kaj de la popolmortigo kaj faru la egalan kaj plenan malarmadon de ĉiuj ŝtatoj elirpunkto de vere daŭra pacpolitiko.

DE LA MALARMADA KONFERENCO, KIU NUN KONGRESAS EN GENEVE,
NI ATENDAS JENAJN REALIGOJN:

Ke ĝi rekonu senescepte kaj senrezerve kiel fincelon de ĉiuj malarmadoklopodoj la plenan kaj egalan malarmadon de ĉiuj ŝtatoj, ĉar la sendanĝereco de ĉiuj ne estas ebla sen la malarmado de ĉiuj;

Ke ĝi kiel unuan efikan paŝon al plena malarmado decidu projekton, kiu malpliigu la nunan armadsituacion de Eŭropo kaj de la mondo je almenaŭ 50 procentoj interne de la sekvontaj 5 jaroj kaj certigu por la jaro 1932/33 efektivan malpliigon je almenaŭ 25 procentoj;

Ke ĝi, precipe adaptiĝante al la landoj jam progresintaj en la materia malarmado, plene malpermesu la specialajn atakarmilojn, kiel bombaeroplanoj kaj longdistancaj kanonoj, ke ĝi same malpermesu la fabrikadon kaj uzon de venen-gasoj kaj bakterioj kaj la privatan faradon de armiloj kaj municio ĉiuspeca;

Ke la forigo de la ĝenerala militservodevo — almenaŭ laŭgrade — estu decidata kaj ke la milita eduko de la junularo kaj la ekzisto de privataj militasocioj estu strikte malpermesata en ĉiuj landoj;

Al la bonvoluloj de ĉiuj landoj, al la juna generacio, pri kies sorto la Malarmada Konferenco decidus unuavice,

Al la kristanoj de ĉiuj eklezioj kaj komunumoj, kiuj en ĉi tiu horo de la respondeco estas speciale vokataj, por fari kuraĝan konfeson por la evangelio de la paco, ni direktas la urĝan alvokon:

Ke ili agadu, por ke ilia propra lando antaŭiru per bona ekzemplo, libervole malpliigante siajn armadojn, kaj ke ili rifuzu ĉiukaze ian pluan plialtigon de la armadoj.

La Krucmilitistoj.

PROPAGANDU por la MOKA-movado, fariĝu membro kaj varbu aliajn!

Krucmilito de Eŭropa Junularo por Malarmado.

Meze en ĉi tiu epoko de la mizero la nacioj vidas aŭtaŭ si taskon, kiu apartenas al la plej grandaj kaj sanktaj taskoj de la homaro kaj kristanaro : nome ke ili demetu la armilojn de la mortigo kaj transformu ilin en instrumentojn de la paco kaj justeco.

La batalo pri la malarmado komenciĝis en la tuta mondo. La pacbatalantoj kaj la militkredantoj staras unuj kontraŭ la aliaj en du armeoj. Milionoj da subskriboj estas kolektitaj, miloj da konferencoj kaj kunvenoj estas organizitaj por vekigi la amasojn el ilia indiferenteco kaj montri al la registaroj la decidan volon de la plimulto en ĉiuj ŝtatoj, kiu postulas la malarmadon kaj la pacon.

La okuloj de milionoj nun direktiĝas al Genève. Tie kolektiĝas la esperoj de la pacamikoj, tie la intrigoj de militistoj kaj militprofitantoj. Ĉu en tiom respondecoplena tempo la bonvoluloj de ĉiuj landoj, precipe el la junularo, ne devus unuigi al krucmilito por malarmado kaj mondpaĉo? Ĉu ili ne devus komenci krucmiliton de la paco? Krucmiliton al Genève? Ĉu ne fine sur la armeistoj de Eŭropo, kie dum jarmiloj marŝis soldatoj kaj konkerantoj, devus marŝi la legionoj de la paco, por demonstracii per simbola agado simpla, sed solena, sian kredon je pli bona mondo?

Ni komencis tian krucmiliton, organizante ĝin sur kelkaj vojoj de la finoj de la eŭropa kontinento ĝis Genève. La formo estas varia laŭ la naciaj kaj lokaj cirkonstancoj. Sed ĝenerale sur la diversaj vojoj ĉiuvespere en alia loko devas okazi kunveno kun partopreno de parolantoj diverslandaj. Kaj laŭlonge de nia internaciaj vojoj ni portos ĝis Genève standardojn kun kruco kaj surskribo : « Treuga Dei 1932 » (Dia Paco 1932). Niaj kunlaborantoj estas la pacamikoj, tute speciale la kristanaj. Kaj ni ĝojas, ke katolikaj rondoj havas gravan parton je la agado.

La ĉefaj vojoj estas jenaj :

Le Havre (2 februaro), Rouen (9 februaro), Paris (14 februaro), Auxerre (21 februaro), Dijon (28 februaro), Villefranche (6 marto), Valence (13 marto), Lyon (20 marto), Ardèche, Genève.

Calais (2 februaro), Boulogne, Lille (9 februaro), Maubeuge (13 februaro), Reims (21 februaro), Nancy, Belfort, Montbéliard, Pontarlier, Lausanne, Genève. Alia branĉo iras post Nancy tra Strasbourg, Colmar, Mulhouse, Basel.

Middelburg (2 februaro), Rotterdam, Haag, Haarlem, Utrecht, Essen, Düsseldorf, Köln (21 februaro), Frankfurt, Stuttgart, Freiburg, Basel, Genève.

Antwerpen (2 februaro), Mechelen, Gent, Bruxelles, Liège, Aachen, Köln ktp.

Aliaj vojoj estas en preparo.

Internaciaj limkunvenoj de la Krucmilito okazos en Heerlen (Nederlando) la 20/21 februaro, kaj en Basel la 19/20 marto, kredeble ankaŭ en iu orienta urbo inter Polujo kaj Germanujo.

Granda findeemonstracio estos en la semajno post Pasko en Genève. Informojn petu de la Internacia Oficejo : Wien VII., Döblergasse 2/26 Aŭstrujo, aŭ de la naciaj sekretarioj :

Belgujo : Magda Yoors - Peeters, Troyentenhoflaan 32, Antwerpen.

Britujo : Fellowship of Reconciliation, 17 Red Lion Square, London WC1.

Francujo : La Réconciliation, 121, Bd. Edouard-Vaillant, Aubervilliers, Seine.

Germanujo : « Abrüstungskreuzzug », Bensberger Marktweg 63, Köln-Dellbrück; kaj Pfarrer Wilh. Mensching, Petzen bei Bückeburg.

Nederlando : D. Ariens-Kappers, Van Eeghenstr. 104, Amsterdam.

Svisujo : Schweizerische Zentralstelle für Friedensarbeit, Gartenhofstrasse 7, Zürich, kaj Elisabeth Menastier, 8, Grancy, Lausanne.

Oficejo en Genève : Donald Grant, 3, Avenue Calas, Champel, Genève. Ĉi-tiu domo ankaŭ akceptas je favoraj prezoj gastojn dum la daŭro de la Malarmada Konferenco kaj sendas informojn.

Letero de la Redaktoro al Siaj Geamikoj.

Ni vivas en epoko de gravaj internaciaj danĝeroj. La estonteco de la paco multe dependos de la Malarmada Konferenco de Genève, kiu la 2 februaro komenciĝas. Vi scias, kiom ni ankaŭ en La Juna Batalanto atentigis pri tio kaj batalis por mondo sen milito kaj sen militpreparo.

En tiu ĉi horo venis la iniciato al granda Krucmilito de Eŭropa Junularo por Malarmado. Kaj oni bonvolis inviti min, akcepti la gvidadon de tiu agado. Unue mi hezitis, sed poste mi akceptis kaj ekagis. Kaj mi nun travojaĝas Eŭropon, por organizi kaj kunigi tiujn el la junularo, kiuj komprenas la gravecon de tia Krucmilito.

Mia aktiveco en la Krucmilito nun tiom absorbas ĉiun mian tempon kaj ĉiujn miajn fortojn, ke mi en ĉi tiuj monatoj, ĝis fine de aprilo, nur malofte trovas liberan horon por aliaj laboroj. Tio signifas, ke mi nun nur maloftege povas okupiĝi pri organizaj aferoj de MOKA.

Unu el la bedaŭrindaj, sed neeviteblaj sekvoj ankaŭ jam estis la prokrastiĝo de ĉi tiu numero de La Juna Batalanto.

Mi do devas peti vian pardonon kaj indulgon por kelkaj monatoj : Bonvolu ne skribi longajn leterojn kaj proponojn, ĉar mi nun ne povas entrepreni novajn laborojn.

Se vi skribas pri gravaj aferoj rilate al J. B., skribu al Köln, kaj se vi skribas pri la Krucmilito, skribu al Wien VII., Döblergasse 2/26, Aŭstrujo. Pri aliaj aferoj bonvolu ne skribi, ĉar mi ne povus respondi!

Multajn el vi mi ja renkontos denove en miaj vojaĝoj, kaj mi esperas, ke ankaŭ en la granda Krucmilito, por kiu mi nun laboradas, MOKA-anoj estos inter miaj plej bonaj kunlaborantoj!

La devizo de la krucmilitistoj estas : Dio volas ĝin! Kaj kun Lia helpo ni venkos!

Wilhelm SOLZBACHER.

MALBONA TEMPO postulas bonajn batalantojn por nia afero. Varbu abonantojn!

ĈU DISERVO AŬ IDOLSERVO ?

Idolservo festas dum nia epoko en la tiel nomata kultura mondo, ankaŭ inter tiu parto de la homaro, kiu sin konfesas kristana, triumfojn. La plej modernaj rimedoj, la plej novaj kaj grandaj akiraĵoj de la tekniko estas uzataj por tio. Preskaŭ memkomprenebla ŝajnas al multaj la malbeninda en senbrida rapideco konsumiĝanta « servo » al la **mamono**, al la **kapitalo**, kiu, ĉiam pli amasigita sur unu flanko, en la manoj de kelkaj malmultaj fariĝis potenco senindulga, brutala, dum ke la popoloj ĝemas en socia kaj morala mizero kaj en ilia ekzisto estas endanĝerigataj. Tamen ĝuste tiuj popoloj, sekvantaj siajn gvidantojn, staras aliflanke kun admiro ekzemple antaŭ la **paradoj de idolana militarismo**. Oni eĉ esprimas sian laŭdon pri la « ritmo » de **milita aviadilaro**, kies vera celdestino estas krimeca detruiga metio. Oni trovas sensacion en tiaj aermanovroj, la gazetaro, ankaŭ la kristana, bedaŭrinde subtenas tion — anstataŭ ke la tuta kristanaro ekstarus kun flama protesto kontraŭ tia infera farajo, preparanta atakon al la Dia kreitaĵaro.

Tute samsence la radio, tiu plej moderna interligilo de popolo al popolo de unu mondfino al la alia, disanoncas ekz. la okazadon de barbara **boksbatalo**, kiu diferencigas de la gladiatoraj bataloj de la idolanaj romanoj eble nur per tio, ke ĝi okazas pro nura monprofito, do fia negoco estas. Kaj jen en la tuta mondo oni plenan nokton streĉe aŭskultas la raporton de tia senspirigita kaj senanimigita « batalo », por poste laŭeble ankoraŭ glori la venkinton kiel nacian heroon. Aŭ la ondoj de la radio laŭtigas poralkoholajn trinkkantojn aŭ transigon de ĥaosa bruoj kaj kriadon en luksaj amuzejoj, dum ke milionoj da homoj malsatas, ne havante panon. Apud tio la ekstaziĝinta amaso prezentas aplaŭdojn en ridindecon ekscigiĝintajn al filmfamulo, aŭ sportementulo staras en la fokuso de la mondokazado. Ĉu, malgraŭ ĉiu laŭrajta, justa taksado de efektiva arto, same ankaŭ de prudenta sporta agado, tia troigita persona kulto ne ankaŭ limas al idolaneco, ĉu ĝi ne estas signo de dekadenco? Al tio ankoraŭ venas la **beleckonkursoj**, la aklamoj por senmeritaj « reĝinoj de beleco », dum ke oni malatentas sennombrajn patrimojn, kiuj pro siaj karaj infanoj luktas kontraŭ zorgoj kaj mizero en vivo de sinofero vere meritplena.

Ĉi ĉion ni kristanoj en multobla rilato subtenas. Kiam fine nia vivo anstataŭ idolservo ree fariĝos kaj estos Diservo? Diservo, konsistanta unuavice en la servo al la proksimulo? Nur tiel povus esti malhelpata aŭ almenaŭ plimildigata la granda danĝero minacanta.

Walter MUDRAK, Vieno.

HELPU ESPERANTON POR LA VENONTA SKOLTA MONDJAMBOREO!

Ni alvokas la esperantistaron, helpi la laboron inter skoltaro. En 1933 la mondtendaro (jamboreo) de la skoltoj okazos en Hungarujo. Oni atendas el ĉiuj landoj sume 50 000 skoltojn. Sama nombro jam ĉeestis la lastan en Anglujo. Kiel ili interkompreniĝu? Ĉie ili nun komencas lerni lingvojn. Nia devo estas, prezentiali ili la facilan Esperanton. La Hungara Skolta Asocio deziras uzi ankaŭ Esperanton en la tendarego, sed la esperantistaro forte propaganda

LA KVIN RABISTOJ

Rakonto por geknaboj ĉiuĝaj.

Mensogo estas peko kaj povas esti ankaŭ eraro, kiel vi rimarkos leginte ĉi-tiun rakonton pri la kvin rabistoj.

Vivadis unufoje kvin ĉefrabistoj, riĉaj kaj potencaj, kvankam ne egalaj, ĉar ili havis malsaman aĝon, kaj ne ĉiu el ili tute sukcesis, reteni la riĉaĵojn forrabitajn de aliaj personoj. Ĉiu ĉefrabisto havis grandan sekvantaron, sed multaj el la sekvantuloj ne sciis, ke ilia ĉefo estas rabisto, ĉar la ĉefoj estis tre lertaj kaj povoscii ŝajnigi, esti tre honestaj homoj. Ĉi-tiuj kvin rabistoj ofte aranĝis reukontojn, kelkfoje ili disputadis inter si kaj minacis unu la alian, sed pli kutime ili konsentis, ĉar konsento estis ofte necesa, por sukcedigi iliajn planojn. Ekzemple, se rabisto I volis rabi ian domon, li devis akiri la permeson de la aliaj; tiam rabistoj II, III, IV kaj V ĉiuj konsentis kondiĉe ke al ili ankaŭ estu permesate kompanse rabi aliajn domojn.

Tiamaniere pasis longa epoko, ĝis unu tagon - estis en la jaro 1914 - la kvin rabistoj tute malpacis inter si kaj ne sukcesis repacigi; tiam la ĉefrabistoj alvokis siajn sekvantarojn kaj instigis ilin, ataki unu la alian kaj detruigi la posedaĵojn de la kontraŭuloj. Ega batalo sekvis kaj daŭris, ĝis kiam preskaŭ ĉiuj riĉaĵoj estis detruitaj; fine unu grupo pli malfortigis ol la alia, kaj ĉi-tiu lasta nomiĝis la venkinto.

Tiam diris la venkinto al la venkito: « La kulpo estis via, kaj vi devos refari por mi ĉiujn riĉaĵojn detruitajn. »

Respondis la venkito: « Vi mensogas, la kulpo estis al vi, se ne tute, almenaŭ parte. Ne estas juste kaj ne estas eble, ke mia sekvantaro refaru por vi la riĉaĵojn. »

Reparolis la kontraŭulo: « Komencu tuj, fari mian ordonon, kaj se vi rifuzas diri, ke vi tutsola estis la kulpulo, mi mortigos vin. »

Post tio la sekvantaro de la venkito komencis laboradi, sed kompreneble ne estis laboro de amo, kaj fakte la tasko estis preskaŭ nefarebla. Por daŭrigi la refaradon de la detruitaj riĉaĵoj, estis baldaŭ necese, ke laboru ankaŭ la sekvantato de la venkinto, kaj la rezulto estis, ke ĉiuj vivadis tre malfeliĉe por ĉiam.

Geknaboj, neniam mensogu!

John NIBB.

kaj instruu en la urboj ĉe la lokaj skolttrupoj, ke ties membroj lernu kaj korespondu per Esperanto. Per la skoltaro ni povas atingi grandan nombron de organizita, progresama, helpema kaj servema junularo, kiu povos per sia praktika uzo kaj ideala mondkompreno helpi por triumfigi Esperanton en la mondo! Numero de „Magyar Cserkész” kun esperantaj partoj, taŭga por propagando, estas havebla por P. 60 aŭ 2 respondkuponoj ĉe Esperanto — Rondo de Hungaraj Skoltoj, Budapeŝt, V., Nagy Sandor-utca 6.

RIGARDO EN LA TEMPON.

La Enkarcerigo de Gandhi.

La ĉefsekretario de MOKA subskribis jenan leteron, kiun diversaj pacifistaj movadoj sendis al la angla reĝo :

Al Lia Moŝto Georgo V-a, Reĝo de la Unuigita Reĝlando de Grandbritujo kaj Norda Irlando, Imperiestro de Hindujo, Defendanto de la Kredo ktp. ktp....

Via Reĝa Moŝto,

La subskribintaj reprezentantoj de pacifistaj movadoj, kiuj bazigas sian agadon sur la kristana idealo de universala frateco kaj respekto je la homa personeco, aŭ sur similaj konvinkoj filozofiaj kaj religiaj.

Konsiderante, ke la persono de Gandhi prezentas nuntempe la belegan idealon de senperforto kaj de la supereco de la spiritaĵoj rilate al ĉiuj materialistaj potencoj de subpremado, konstatas, ke la enkarcerigo de Gandhi, se ĝi estus daŭrigata, signifus certan venkon por ĉi lastaj.

Opiniante, ke grandanima mezuro helpus efike, por trankviligi la spiritojn, kaj preparus interproksimigon de la popoloj kaj de la rasoj, favoran al restarigo de la tu'monda bonfarto,

Petegas Vian Reĝan Moŝton, preni mezurojn de alta bonvolo rilate al Gandhi kaj ĉiuj aliaj politikaj malliberuloj, kiuj estas anoj de la senperforto kaj kiuj nun estas malliberigitaj, ordonante ilian tujan liberigon.

Konflikto inter Hindujo kaj Japanujo en Manĉurio.

Rilate la konflikton en Manĉurio ni ricevis tutan monton da materialo kun la peto, publikigi ĝin en La Juna Batalanto. I. a. nia ĥina amiko kaj iama MOKA-sekretario P. Joh. Bapt. Kao O. F. M. (Romo) sendis al ni emociigan alvokon. Ni longe hezitis, ĉu ni devas okupiĝi pri la afero en nia gazeto, kaj fine decidis, ne publikigi longajn artikolojn, sed nur fari mallongan konstaton. La kaŭzo ne estas ke ni havus timon, sed simple la manko de loko. Se ni publikigus artikolon de ĥina flanko, la lojaleco postulus, ke ni enpresigu poste ankaŭ artikolon de japana flanko. Tion ni nun ne povas, ĉar loko mankas. Sufiĉe jena opiniesprimo :

La situacio jura en Manĉurio estas tre komplikita, kaj ni ne povas esplori, ĉu la plendoj de Japanujo pri kontraŭkontrakta sinteno de ĥinoj estas pravaj aŭ ne. Sed eĉ se ĉiuj japanaj plendoj estus veraj, Japanujo neniel havus la rajton, juĝi en sia propra afero. Ĝi estus devinta submeti la aferon al senpartia tribunalo, kaj la sinteno de Hindujo ĉe la Ligo de Nacioj estis tute korekta, dum ke tie de Japanujo ne estis tia. Japanujo okupis ĥinan teritorion, sendis trupojn, ĵetis bombojn, mortigis senkulpajn homojn. Tio estus maljusta krima ago, eĉ se ĉiuj kaŭzoj, kiujn Japanujo citas, estus pravaj. Kiel en la vivo de la individuoj, neniel povas juste decidi la brutala potenco, sed nur superpartia juĝejo! Kiam la nacioj tion komprenos kaj respektos?

Stranga sinteno de la Esperanto-gazetoj de Oomoto.

Dum la manĉuria konflikto ni rimarkas tre strangan sintenon de la gazetoj « Oomoto » (Kameoka) kaj « Oomoto Internacia » (Paris), organoj de tiu japandevena sekto religia, kiu sukcesis gajni tiom da simpatio en kelkaj rondoj Esperantistaj diverslandaj. Tiuj gazetoj, kiuj estas organoj de asocio, kiu pompe

nomiĝas « Universala Homama Asocio », anstataŭ objektive kaj delikatsente paroli pri la konflikto inter japanoj kaj ĥinoj, simple defendas la vidpunkton de la japana registaro.

Kun ridinda aroganteco « Oomoto Internacia » eĉ skribis :

« Kiam la Ligo de Nacioj invitis usonan delegiton al sia konferenco sen unuaŭtima voĉdono, ĝi tiam mortis aŭ almenaŭ grave vundiĝis — verdire, ĝi malbone naskiĝis kaj de la tago de sia fondiĝo ĝia vivo estis kalkulata. Se ĝi mortus nun, neniu domaĝus, ĉar nun estas nia Universala Homama Asocio, kiu estas pli justa, pli homama kaj ankaŭ pli universala. »

Kaj « Oomoto » plenigis multajn paĝojn per insultoj kontraŭ la ĥina popolo. Povas esti, ke ĥinuloj havas nun multajn « banditojn ». Sed ĉu pri tio vere la aliaj nacioj estas senkulpaĵ? Kaj certaj agoj, kiujn ŝindaj senpartiaj raportantoj rakontis pri japanaj soldatoj en Manĉurio, estas ne malpli brutalaj ol agoj de « banditoj ». Farisee paroli pri sia najbaro, estas facile. Banditoj aŭ aliaj brutaluloj, eĉ organizitaj, ekzistas ĉie (eĉ en la plej civilizitaj landoj de Eŭropo, kie ili ĝenerale portas maskon patriotan aŭ alipolitikan). Ni laboru kaj batalu por internacia ordo de justeco! Kaj ni finigu la metodojn de la sekreta diplomateco, kiuj en la Ligo de Nacioj ŝajne malebligis tujan kontentigan solvon de la manĉuria konflikto. La metodoj de la malnovaj kaj maljunaj diplomatoj jam kostis sufiĉe da sango kaj mono al la mondo : Estas tempo, por forigi ilin!

Incito al milito estas krimo.

La Leĝdonanta Komisiono de la Pola Respubliko transdonis al la justeministro projekton por nova pola punleĝlibro, kiu eble jam baldaŭ estos prezentata al la parlamento. La projekto estas interesa por ni, ĉar unu el ĝiaj punktoj estas la unua paŝo, por enkonduki la principojn de la Kellogg-Briand-Pakto (kontrakto por neleĝigi la militon) en la internan leĝokodon de ŝtato, en kiu do la incito al milito estas deklarata kiel krimo. La artikolo 111 tekstas en la projekto jene : « Kiu publike alvokas al atakmilito, estas punata per malliberigo de 1/2 - 5 jaroj. » Oni povas kritiki, ke tia leĝo ankoraŭ lasas multajn liberecojn por la ŝtata preteksto de la tiel nomata « defendmilito » kaj ankaŭ, ke la paragrafo 2 de la sama artikolo aldonas, ke la puno nur tiam okazas, se la sama krimo estas ankaŭ punata en la ŝtato, kontraŭ kiu la militincito estas direktata. — Tamen sendube la enkonduko de tia leĝo estus granda progreso. La pola iniciato meritas imiton de multaj ŝtatoj. Ĉar estas tempo, ke oni ĝenerale ekkonu, ke la milito estas krimo kaj ke la incito al milito estas ankaŭ krimo.

AĈETU BONAĴN LIBROJN !

Libraron bonan mendu vi,
Enhavas sanktajn fortojn ĝi
Kaj efikados en estont'
Kiel plej riĉa benefont'!

La bona libro estas ben'
Por hom' en ĝojo kaj ĉagren';
Ankoraŭ legos la nepar'
Kun ĝojo en via librar'.

La bona libro estas fort'
Dum bona kaj malbona sort';
La ben', akompananta ĝin,
Konstante renovigas sin.

Laŭ germana originalo tradukis

Alois NORBERT.

Bonajn Esperanto-librojn niaj ĝeamikoj ĉiam aĉetas ĉe la Eldonejo La Juna Batalanto, tiamaniere subtenante nian gazeton kaj nian movadon.

La Pacifista Movado en Polujo

De Pawel Roch, Krakow.

En teatraĵo de J. R. Bloch (Le dernier empereur), kiu estas ludita antaŭ kelkaj jaroj en Paris, okazas diskuto inter la juna monarko kaj liaj generaloj kaj ministroj. La monarko estas kontraŭ militdeklaro, dum ke la generaloj kaj ministroj rekomendas la militon. Unu el tiuj anoj de la milito atentigas pri la amasoj, kiuj sur la strato demonstracias por la milito. La imperiestro respondas al tio: « Mia devo estas, aŭskulti ne nur tiujn, kiuj krias, sed ankaŭ tiujn, kiuj silentas! »

Tio estas vera parolo! En multegaj landoj de la hodiaŭa Eŭropo la anoj de la perforto, malamoro kaj brutaleco kriadas plej laŭte. Koscie aŭ nekoscie ili plenumas la ordonojn de la « sanga internacio de la armadindustrio ». Tamen ni eĉ ne unu momenton rajtas forgesi, ke malantaŭ tiu areto krianta por la milito staras milionoj da homoj, kiuj pensas tute alie kaj deziras pacon. Bedaŭrinde la pacifistaj fortoj estas nur malmulte organizitaj.

I.

La organizita pacifista movado estas en Polujo multe malpli forta ol en Okcidenta kaj Centra Eŭropo. En Warszawa ja jam antaŭ la milito ekzistis « *Unuiĝo de la Pacamikoj* » (Towarzystwo Przyjaciół Pokoju) kun D-ro Pollack kiel prezidanto. Post la Granda Milito la agado de tiu unuiĝo multe plivigliĝis kaj speciale okupiĝis pri la pola-germana kaj pola-litova interproksimiĝo. Konsiderinda sukceso de tiu agado estis la organizado de la Internacia Paĉkongreso, kiu en julio 1928 okazis en Warszawa. Bedaŭrinde D-ro Pollack baldaŭ poste mortis, kaj la aktiveco de la unuiĝo katuze de tio malplivigliĝis. Krome kelkaj eminentaj kunlaborantoj estis tute absorbataj per la internpolitikaj konfliktoj, kiujn Polujo en tiu epoko trapasis.

Apud tiu unuiĝo estiĝis post la milito la tiel nomata « *Federacio de la Amikoj de la Ligo de Nacioj* » (Federacja Przyjaciół Ligi Narodów). Eminentaj scienclistoj kaj politikistoj apartenas al tiu asocio. Bedaŭrinde la membreco de veraj naciistoj ne pormesas al ni, nomi tiun organizaĵon pure pacifista.

Viglan propagandon faras la pola branĉo de la *Internacia Virina Ligo por Paco kaj Libereco*. Krome ni devas citi en ĉi tiu loko la polan grupon de la *Pan-eŭropa Unio* (prezidanto: eksministro D-ro A. Lednicki) kaj la tre viglan *Ligon por Homrajtoj*.

NIA MOVADO

Internacia Oficejo.

La *Ekzekutiva Komitato de MOKA* kunsidis en Koeln en decembro kaj preparolis la situacion kaj la estontan agadon.

La *internacia sekretario* devos preskaŭ ĉiam vojaĝi en la venontaj monatoj ĝis fine de aprilo kaj ne povas korespondi en tiu ĉi tempo. Gehelpantoj zorgos pri tiu parto de la korespondado, kiu povas esti prilaborata de ili.

Membroj. En la venontaj tempoj, kiuj estos speciale malfacilaj kaj gravaj por movado kiel nia, MOKA bezonas pli grandan organizaĵon forton. Ni bezonas ne nur okazajn kunlaborantojn, sed *membrojn*. Kaj ni bedaŭrinde bezonas ankaŭ la kotizon de tiuj membroj!

Aŭstrujo.

Nacia sekretariejo. La ĉefsekretario de MOKA estis dum kelka tempo en Wien kaj povis preparoli multajn aferojn kun tieaj geamikoj. Oni faris specialajn klopodojn ĉe katolikaj ligoj. *Landeck (Tirol).* La 30 sept. okazis kunveno aranĝita de nia amiko Hilkersberger en la katolika unuiĝdomo kun parolado de nacia sekretario Walter Mudrak pri « katolika pacmovado, abstinencmovado, Esperanto ». Ĉefe partoprenis laboristoj.

Salzburg. La 19 nov. okazis en Salzburg (Borromaeum) ĉefkunveno de la katolika grupo « Estonteco », kiu konsistas el pastroj, teologoj kaj studentoj. Oni elektis novan grupestraron. Prezidanto estas Pastro D-ro Fr. Christianell, grupestro J. Kaps, sekretario fariĝis nia jama MOKA-sekretario por Aŭstrujo Peter Schwab, nun Fr. Anselm Schwab O. S. B. D-ro Christianell gvidas Esperanto-kurson por studentoj laŭ la Cseh-metodo. La grupo sukcese laboras.

Wien. Esperanto-kursoj: Nova kurso por komencantoj ĉe Katolika Krucligo, 15 partoprenantoj, ĉefe gejunuloj, post la kurso daŭrigo de kunvenoj por ekzercado kaj pliperfektigo, gvidas W. Mudrak (jaŭde de la 7a — 9a vespere en la hejmo de la Krucligo, Wien I., Judenplatz 8/I.) Esperanto-kurson en Katolika Junmetiista Unuiĝo gvidas nia amiko Alois Berndl. Kursoj por komencantoj ankaŭ ĉe KUE kaj en Calasantium.

Wien. Gimnastikaj Tagoj de Orel en Wien 1932: Post dek jaroj da agado, la katolikaj gimnastikistoj el la Ĉeĥoslovaka Orel (Aglo) en Wien volas denove montri siajn progresojn al la publiko. La grandaj festoj de tiu asocio volas unuiĝi ĉiujn niajn katolikajn fratojn. Dum tiuj festoj, kiujn organizas Landa Komitato de Ĉeĥoslovaka Orel en Wien III., Schuetzengasse 30, la Orel-Esperantistoj deziras saluti siajn Esperantistajn amikojn el ĉiuj landoj en malgranda festvespero dimanĉon, la 15 majo 1932. Oni esperas, ke la amikoj venos grandnombro, por fortigi la Esperantistojn de „Orel“ en iliaj grandaj idealoj. Informojn donas: Esperanta Sekcio de Katolikaj Gimnastikistoj de Ĉeĥoslovaka Orel, Wien X., Puchshausgasse 39a. A. B.-F. R.

Wien. Paroladoj: D-ro W. Solzbacher, ĉefsekretario de MOKA, faris en januaro paroladojn en la Esperanto-Grupo de la Katolika Krucligo, en la Katolika Junmetiista Unuiĝo kaj en la Mondjunulara Ligo.

Belgujo.

La ĉefsekretario de MOKA estis dufoje en Belgujo. Li intertraktis kun gvidantoj kaj speciale preparolis eblecojn de internacia agado okaze de la venonta Malarmada Konferenco de Genève.

Ĉeĥoslovakujo.

Praha. En hungarlingva jubilea libro, kiun la hungaraj katolikaj studentoj en Ĉeĥoslovakujo, organizitaj en la Prohaszka-Rondo (Prohaszka Koer), eldonis, troviĝis du artikoloj de la ĉefsekretario de MOKA, unu pri MOKA kaj ĝia agado por internacia kaj socia paco.

Danujo.

Nia nacia sekretario de MOKA, Pastro L. Wolff en Haderslev, daŭrigis sian agadon pere de la multlingva katolika gazeto « Universal », en kiu diversaj amikoj de nia movado publikigas artikolojn en Esperanto kaj aliaj lingvoj.

Franĉujo.

La ĉefsekretario de MOKA vizitis gvidantojn de diversaj katolikaj junularaj ligoj kaj ankaŭ nian francan MOKA-sekretaron Prof. Muffang.

La nacia sekretario de MOKA eldonos malgrandan dumonatan informbultenon de MOKA en multobligita formo. Kunlaboron petas Prof. P. J. A. Muffang, 14bis, av. Galois, Bourg-la-Reine (Seine).

Grava katolika revuo « Les Documents de la Vie Intellectuelle », eldonata de francaj dominikanoj, enhavis 70-paĝan artikolegon de la ĉefsekretario de MOKA pri la katolitka junularo de Germanujo. Enestis ankaŭ dupaĝa dokumentaro pri la germana landa asocio de MOKA kaj ĝia agado kaj pri la MOKA-movado ĝenerale.

Germanujo.

La nacia sekretario Heinz Kolvenbach dissendis novajn cirkulerojn.

En la sekvonta tempo niaj grupoj kaj geamikoj devos energie okupiĝi pri la propagando okaze de la Malarmada Konferenco de Genève. Ni partoprenos per ĉiuj fortoj je la Krucligo de Eŭropa Junularo, kiun gvidas kelkaj el niaj amikoj kaj je kies prepara kunsido en Koeln (3 januaro) MOKA-anoj multnombro partoprenis. Detalojn postulu de la Internacia Sekretariejo: Wien VII., Doeblergasse 2.

Viatra Renkonto de MOKA-anoj okazis fine de decembro kaj komence de januaro en Brilon en Vestfalujo. Okazis diskutoj kaj paroladoj kaj ekskursoj en la belan ĉirkaŭaĵon. La renkonton organizis la Sudvestala sekcio de Mondjunularo Katolika.

Dueren. MOKA-grupo bone laboras malgraŭ malfacilaĵoj.

Duesseldorf. Pestalozzi-Lernejo de MOKA sukcese funkcias. Interesuloj petu detalan agadraporton de la estro: H. Kolvenbach, Stoffeln 23.

Essen. Regiona konferenco de katolikaj Esperantistoj estas preparata de niaj tieaj geamikoj.

Koeln. Niaj geamikoj efike partoprenas agadon por malarmado. Parolado de D-ro W. Solzbacher pri malarmado en la grupo de la Pacligo de Germanaj Katolikoj.

Wenelsburg. August Günther paroladis pri MOKA en la katolika junulara unuigo. Fondigis Esperanto-grupo de MOKA sub gvido de Franz Lüttig.

Gazetaro. Kelkaj gazetoj denove favore atentigis pri Esperanto, MOKA, La Iuna Batalanto. Novajn anoncojn pri J. B. publikigis «Allgemeine Rundschau», «Volk und Heimat», «Missionsblaetter», «Kolpingsblatt», «Mitteilungen fuer die Vorsteher des Kath. Gesellenvereins», «Lotsenruf». Lotsenrufe aldonis al sia tuta eldonnombro nian flugfolion «La Katolika Junularo Lernas Esperanton»..... La «Kolping-Kalendaro por 1932» enhavis 5-paĝan artikolon pri «Kial lerni Esperanton» kun atentigo pri MOKA kaj JUNA BATALANTO.

Jugoslavujo.

Zagreb. Nia delegito Vlado Kunić raportas: «Mi rekomencas plejenergie labori por MOKA, pri kiu mi jam kelkfoje paroladetis kaj skribis en «Nedjelja» («Dimanĉo» organo de katolika junulara movado «Krizari» («Kruculoj»). Mi fariĝas ankaŭ sekretario de Studenta Esperanto-Klubo ĉi-tiea.»

Norvegujo.

Oslo. Nia delegito A. Björnstad raportas: «Oni nun ankaŭ en la katolika junularo de Norvegujo komencas interesigi pri Esperanto. Antaŭ Kristnasko mi faris laŭ speciala peto, paroladon pri Esperanto en la katolika junulunuigo «Unuigo de Sankta Aloizio» en Oslo. Post la parolado estis provleciono laŭ la Cseh-metodo. Ŝajnis, ke oni kun granda intereso aŭskultis la instruon. La direktoro de la unuigo, pastro Laudy, trecege interesigis por Esperanto, kaj nuntempe li lernas la lingvon. Mi propagandas inter la norvegaj katolikoj kaj precipe inter la junularo, ke oni devas fondi Esperanto-klubon. Mi esperas, ke tio okazos en ĉi tiu vintro.»

Svisujo.

Nia nacia sekretario Eugen Vogt en Svisujo preparas broŝuron pri la katolikaj junularaj asocioj en Eŭropo. Ĝi enhavos longan artikolon pri MOKA, verkitan de la ĉefsekretario de nia ligo.

SUR NIA LIBROTABLO

Recenzejo de Novaj Libroj de Internacia Intereso.

Gerard Walschap, Nooit Meer Oorlog, Derde Druk, Hooger Leven, Lemmestr. 12, Antwerpen, Belgujo, 112 pĝ., 1931.

Maurice Lecat, Contre la Guerre avec Einstein, ĉe la aŭtoro, Hérent-Louvain, Belgujo, 84 pĝ., 28 decembro 1931, prezo : 12 belgaj frankoj.

Du libroj de belgaj katolikoj, unu en flandra kaj la alia en franca lingvo. Ambaŭ estas radikalaj pacifistoj, ambaŭ metas devizojn de la papo je la komenco. Gerard Walschap estas verkisto kaj redaktoro de la kuraĝa semajna gazeto « Hooger Leven », Maurice Lecat estas sciencisto kaj profesoro de matematiko. Mi ne povas imagi, ke iu homo, kiu serioze tralegis unu el tiuj du libroj, povas resti facilanima indiferentulo pri la problemo de paco kaj milito. Ambaŭ aŭtoroj estas anoj — laŭ mia opinio tute prave — de senescepta kaj senrezerva rifuzo de ĉiu milito, Lecat aldonas kelkajn terurajn ilustraĵojn, kiuj montras la militon, kia ĝi estas. Mi rememoras, ke en la ĉefurbo de eŭropa lando la polico malpermesis la publikan elmontron de tiaj bildoj, ĉar ili estus danĝeraj por la publika ordo. Vere, ili ne estas agrablaj. Sed por eviti la mizeron, de kiu ili estas nur malforta bildo, oni devas kontraŭbatali militon kaj militarismon kaj militpreparon. Kaj al tio alvokas la du rekomendindaj libroj de Walschap kaj Lecat.

Leo Weismantel, Elisabeth, Die Geschichte eines denkwürdigen Lebens, Sebaldis-Verlag, Nürnberg 1931, 560 pĝ. kun enkonduko kaj finparolo de la poeto, en plej bona ortolo kun ĉarmaj miniaturbildoj de Andreas Meier, RM 7.—

Leo Weismantel estas unu el la favoritaj poetoj de la katolika junularo germanlingva, lia libro pri Sankta Elisabeth fariĝos la favorita libro de la amantoj de tiu granda sanktulino. Li ne superversis sur ŝian bildon dolĉacan saŭcon, li ne klopodis forigi la homajn trajtojn el ŝia vizaĝo, li montras la reĝindon, principinon kaj postan filinon de Sankta Francisko ne nur en ŝia ĉarmo, sed ankaŭ en la mizero de ŝia koro kaj en la suferanta forto, kiu gajnis al ŝi la kronon de la sanktuloj... En la libro de Weismantel Elisabeth viviĝas el la mezepoko kaj paŝas denove tra la germanaj landoj, kies propran karakteron kaj kies homojn la poeto scias tiel mirinde kompreni kaj komprenigi.

Dehen, Peter, Schreinermeister, Doktor der Philosophie und der Rechtswissenschaften, Leben und Gegenwart, Ein Führer für die gewerbliche Jugend, 8-o (VIII + 104 pĝ.) Freiburg 1931, Herder, kart. 1.20 RM.

La aŭtoro nomiĝas fiere lignajista majstro kaj doktoro en filozofio kaj juro. Li parolas al junaj laboristoj pri memedukado, pri la senco de la vivo, pri seksaj problemoj, pri edzeco kaj familio, pri patrujo kaj ŝtato, pri ekonomio, laboro, profesio, tekniko, sporto kaj multaj aliaj aferoj. La libro estas fidinda gvidanto por nia junularo!

Peter Dörfler, Der Bubenkönig, Don Bosco und seine Schlingel. Kun bildoj de Rudolf Hesse, 8-o (VI + 206 pĝ.) Freiburg 1931, Herder, broŝ. 2.80 RM, kart. 3.30 RM, tolbind. 4.— RM.

Antaŭ nelonge ni rekomendis la libron de Dörfler pri la juna Don Bosco. Nun la aŭtoro verkis en la sama vivoplena kaj bonhumora maniero libron pri Don Bosco kaj liaj buboj. Belega rakonto!

Anna Richlin, Im Vorraum der Zukunft, Der Roman eines jungen Mannes, 8-o (VI + 352 pĝ.), Freiburg 1931, Herder, broŝ. 4.60 RM, tolbind. 6.— RM.

Svisa instruistino verkis la romanon de juna viro, kiu fariĝis interesa romano el la medio de la gazetaro.

Heinrich Mohr, Allhier verkauft man Weisheit, Treuherzige deutsche Geschichten, dargeboten von H. Mohr, 8-o (VIII + 174 pĝ.), Freiburg 1931, broŝ. 3 RM., tolbind. 4.50 RM.

Bela kolekto de fabloj, parabloj, legendoj kaj popolrakontoj, taŭgaj por junularo kaj popolo.

Stephan Berghoff, Von Stromern und Vagabunden. Kun bildoj de J. Thiel, 3-o (VIII + 156 pĝ.), Freiburg 1931, Herder, broŝ. 2.20 RM., tolbind. 2.80 RM.

Homaj sortoj rakontitaj de vagabundoj. Rakontoj naivaj kaj vivofreŝaj. La vivo de la vagabundoj estas pli kruda, pli ŝanĝiĝema, pli danĝera ol tiu de trankvilaj burĝoj. Ankaŭ tiuj uloj, pri kiuj la mondo ridas kaj indigniĝas, estas homoj! Lernu tion el la libro!

Die Subskriptionsfrist

für die Leinenausgabe des „Großen Herder“ in
12 Bänden und einem Welt- und Wirtschafts atlas
geht zu Ende

Um wirklich allen Volksschichten das zeitgemäße
große Nachschlagewerk zugänglich zu machen,
wurde ein Vorbestellpreis festgesetzt, innerhalb
dessen folgende Ratenzahlungen möglich sind:

Bei einmaliger Vorauszahlung	M. 300.—
In 5 Jahresraten von je M. 65.—	= M. 325.—
In 10 Halbjahresraten von je M. 33.—	= M. 330.—
In 20 Vierteljahresraten von je M. 16.75	= M. 335.—
In 60 Monatsraten von je M. 5.75	= M. 345.—

Mit dem Erscheinen des zweiten Bandes (Fe-
bruar 1932) wird dieser Sonderpreis ungültig. Erläutern
Sie also, das Werk noch rechtzeitig zu erwerben,
damit Sie den Vorteil des Subskriptionspreises
zu genießen vermögen. Probehefte und Pros-
pekte bekommen Sie kostenlos in Ihrer Buch-
handlung oder vom Verlag. Bei beiden können
Sie auch subscribieren!

DER VERLAG HERDER • FREIBURG I. BR.

ALIĜU SENPROKRASTE
al la 10 a jubilea eldono de
BES-Adresaro

de Esperantistoj el ĉiuj landoj. Tiu ĉi modele kaj praktike aranĝita helpilo bezonega por ĉiu Eisto, kun portretoj kaj registro laŭfaka eĉ laŭinklina, ebliganta tuj trovi la deziratan adreson, celas kolekti adresojn de **ĉiuj** Eistoj kaj de **ĉiuj** E-entreprenoj. — Simpla aliĝo : 0.50 Fsv (0.50 Mg aŭ 2 resp. kup.), aliĝo kun adresaro 1 Fsv, kun adresaro kaj portreto 1.50 Fsv, anonca pago 25 Fsv. — Postulu detalan prospekton de l'eldonanto:

**BES (Boh. Esperanto-Servo),
POTŠTEJN**

Ĉeĥosl., Eŭropo.

Esperanto-Societoj kaj Grupoj !

Gajnu la junularon !

Du celoj :

- | | | | |
|---|---|--|---|
| 1 | 1 | Skoltoj, lernu Esperanton ! | 1 |
| 9 | 2 | Skoltoj, korespondu Esperante ! | 9 |
| 3 | | Por : | 3 |
| 2 | | | 3 |
| | 1 | XI-a Internacia Tendaro de Skolta Esperantista Ligo (Scl) Julio 1932 apud Londono, | |
| | 2 | Tutmonda Skolta Jamboreo 1933 apud Budapeŝt, Hungarujo. | |

Jen okazo ! Ekagu !

Instigu lokajn skoltasociojn, trupojn, knabojn ! Instruu ilin !

Skribu al

Hungara Skolta Esperantista Rondo,

Budapeŝt V, Nagy Sandor-U. 6, Hungarujo.

DIE KRISE

*zwingt uns alle, zwischen
Notwendigem und Überflüssigem
zu unterscheiden,*

EBEN DARUM

*schätzen
die Überblick brauchen,
die Verständigung suchen
die Friedensfreunde,
die sich der Entscheidung
des Geistes stellen, die*

BERICHTE

*zur Kultur- und Zeitgeschichte.
Herausgeber : Nikolaus Hovorka.*

Der neue Zeitschriften-Typ :

*Kostenlose Probehefte
in jeder guten Buchhandlung
oder bei*

*Quantität in qualitativer Auslese.
Reinhold-Verlag, Wien, IX.,
Löblichg. 3.*

ALLGEMEINE RUNSCHAU

Wochenschrift für Politik und Kultur, Herausgegeben

von Dr. Georg MOENIUS

Steht im 23. Jahrgang und hat sich nach dem Urteil der Presse « prächtig verjüngt ». Ein **erster Mitarbeiterstab** nimmt in **programmatischen Aufsätzen** Stellung zu allen Fragen der Religion, Kultur und Politik. Die Rubrik « **Blicke auf die Zeit** » gibt eine Uebersicht, die die verwirrenden Tagesereignisse klären und beurteilen hilft.

Keiner Partei dienstbar, abendländisch und völkerversöhnend. An Sondernummern sind erschienen : 2 Abendland-, 4 Belgien-, 2 Russland-, 1 Polen-, 1 St. Augustinus-Nummer, 2 Nationalsozialismus-Nummern.

Urteile über die Allgemeine Rundschau :

« Die Zeitschrift hat Geist und Charakter. Ich freue mich auf jede Nummer. »
(Pfarrer W. in B.)

« Aus dieser so prächtigen und hochstehenden Zeitschrift gewinne ich Belehrung, Anregung, eine tiefere Einsicht in die Belange von Kultur und Politik, und es soll mir eine selbstverständliche Dankesschuld sein, immer wieder auf die Vorzüge der Allgemeinen Rundschau empfehlend und werbend hinzuweisen. »
(S. K. in Greven)

« Endlich einmal auch ein katholisches Blatt, das für die Wahrheit eintritt ! Es hat wirklich heute eine Mission, die katholische, zu erfüllen. Gott schütze und stärke es ! (Ein Universitätsprofessor der kath. Theologie).

« Ich will ganz offen vor aller Welt meine Meinung sagen : Mit heiliger Freude hat es mich erfüllt, dass sich Ihre Zeitschrift mit solch wohlthuender Aufrichtigkeit in den Dienst der wahren Friedensvermittlung gestellt hat. » (Ein Universitätsprofessor der kath. Theologie).

« Endlich haben wir eine katholische Zeitschrift, wie wir sie seit langem ersehnten. Oh, dass doch unsere sogenannten « katholischen » Zeitungen von der Allgemeinen Rundschau lernen möchten ! Gott segne ihr Wirken ! »
(Pfarrer H.)

« Ich bin zur Ueberzeugung gekommen, dass Ihre Zeitschrift die wahrheitsliebendste, kulturell höchstehendste, geistig und stilistisch vornehmste ist. »
(F. K., Ehingen, 22.4.31).

Verlangen Sie Probenummern oder bestellen Sie ein Probeabonnement zum Vorzugspreis von M 3. — für das Vierteljahr !

Verlag der « Allgemeinen Rundschau »
München, Galeriestr. 35 a

ANONCETOJ.

Anoncetoj, speciale pri korespondado, kostas 0,50 RM., ĝis 20 vortoj.

Korespondadon kun katolikaj junuloj deziras Kl. Juosas Zasas, Kunigu Seminarija, Telšiai, Litovujo.

Ĉu vi volas korespondi? Skribu tuj al: Katolika Esperanto-Grupo, Planckstr. 117-II., Essen, Germanujo.

Katolika Esperanto-Literaturo

- Eldonaĵoj de « *Espero Katolika* », aperintaj antaŭ la milito, nun haveblaj de la Eldonejo La Juna Batalanto, en Francujo ankaŭ de Prof. P. J. A. Muffang, 14-bis, av. Galois, Bourg-la-Reine (Seine).
- Kato kun botoj, fabelo por infanoj**, luksa eldono, 6 ilustraĵoj 0.15 RM.
- Cindrolino**, el sama kolekto, 6 ilustraĵoj 0.15 RM.
- Unua Katolika Esperanto-Kongreso**, raporto de D-ro Corret 0.15 RM.
- La Katolikaj Esperantistoj ĉe la 2-a Kongreso de Esperanto** en Genevo (1906). Plena raporto kun la prediko de P-o Em. Peltier 0.15 RM.
- Katolikaj Kunvenoj dum la Tria Kongreso** en Cambridge (1907) 0.15 RM.
- Katolikaj kunvenoj dum la Kvara Kongreso** en Dresden (1908) 0.15 RM.
- Pri unu speco de kurbaj linioj, koncernantaj la V-an Eŭklidan postulaton**. Verkis Profesoro Dombrovski (dua eldono) 0.30 RM.
- Pri novaj trigonometriaj sistemoj**. Originale verkis Profesoro Dombrovski 0.75 RM.
- Per Telefono**. Sceneto de Jacques Freneuze; kun permeso de la aŭtoro tradukis Josée Guivy 0.15 RM.
- Imitado de Jesu-Kristo**. 1-a libro; tradukis Paul Deschamps. 100 pĝ. 0.50 RM.
- Hebrea Kalendaro**, originale verkita de Pastro Jakobo Bianchini (Italo), kun « Imprimatur » de M-ro Renou, Ĉefepiskopo de Tours 0.15 RM.
- Internaciismo kaj Pacifismo**, el « L'Action Franciscaine » tradukis Ary-Bourg 0.15 RM.
- Ruĝuloj, kion ili volas**, de Hilaire de Barenton, tradukis Paul Deschamps 0.15 RM.
- Flavuloj, kion ili volas**, de Hilaire de Barenton, tradukis Paul Deschamps 0.15 RM.
- Lando de Mirakloj**, el « L'Œuvre de Lourdes », de D-ro Boissaries, tradukis Em. Peltier 0.30 RM.
- La Hipotezoj pri Lourdes**, nova kompreno pri la miraklo kaj la naturo, de Joseph Serre, tradukis Gesinjoroj Ranfaing-Zabilon d'Her (eldono de Presa Esperantista Societo) 0.50 RM.

Oni aldonu 10 % por sendelspezoj.

BONAĴN LIBROJN en Esperanto aĉetu de la Eldonejo La Juna Batalanto.
Postulu prezaron!